

SEPTEMBRO 2011

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2011:4

96-a Universala Kongreso de Esperanto




Mil kvincent partoprenis
Universalan Esperanto-kongreson
en Kopenhago.
Ettusenfemhundra deltagare
i internationella esperantokongresen
i Köpenhamn.

Maldekstre: Ann-Louise Åkerlund kaj Dan
Palm informas pri la sveda Esperanto-
movado dum la movada foiro.
Foto: Leif Nordenstorm.

Sube dekstre: Salono Zamenhof en Bella
Center, kie okazis la plej grandaj aranĝoj.
Foto: Olof Pettersson.

Sube maldekstre: Monika Lund Machlik de
Norvegio. En Esperanto-Domo en Lesjöfors
okazis Renkontiĝo de Esperantistaj familioj.
Foto: Anita Dagmarsdotter.



LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Septembro 2011 • 99-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Pingvintryck

Prenumeration 2011: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2011:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr,

754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

e-post: laespero@esperanto.se

Stoppdatum Utkommer senast

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj

Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5-6 31 oktober 30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Thordis Samuelsson



Kie vi naskiĝis?

Mi naskiĝis en Södra Ving, paroĥo inter Borås kaj Ulricehamn.

Kie vi loĝas?

Nun mi loĝas en Jönköping.

Pri kio vi laboras?

Mi estas agronomo kaj laboras en la gubernia administracio pri konsilado pri sterkado kaj pri protektado de kreskaĵoj.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Mi interesigas pri politiko. Mi estas membro de Maldekstra partio. Mi estis dum dekdu jaroj ano de la

komunuma deputitaro (*kommunfullmäktige*). Nun mi estas estrarano de la komunuma energia kompanio. Ankaŭ mia ĝardeno estas intereso.

Ĉu vi havas familion?

Mi havas edzon kaj tri infanojn, kiuj ne plu loĝas ĉe ni.

De kiam vi interesigas pri Esperanto?

Mia patro interesigis min, kiam mi estis knabino. Li organizis kurson por mi kaj por mia fratino. En 1990 mi partoprenis someran kurson en Karlskoga kun mia plej juna filo, kiu tiam havis naŭ monatojn.

Ĉu vi havas au havis iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Ne, sed mi estas membro de Sveda Esperanto-Federacio kaj de Universala Esperanto Asocio.

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

La vortaro.

Ĉu ekzistas iuj aliaj interesaj pri vi?

Ne, mi nun ne pensas pri tiaj.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

VORTOJ DE LA REDAKTORO

Jen ankoraŭ unu numero de La Espero. Mi tre multe dankas al vi kiuj sendis materialon por ĝi. Mi ricevis tre multe. Eble pro tio tiu ĉi numero estas iom densa.


Ni tamen estu feliĉaj ĉar la numero estas densa, ĉar tio montras ke multo okazas en la Esperanto-movado.

Mi povas rakonti al vi ke nun okazas ŝanĝiĝo en mia privata vivo. Mi ne plu laboros kiel pastro, sed kiel direktoro de Fjellstedtska skolan, organizo, kiu prizorgas la pluedukadon de pastroj. Mi ne certas ĉu tio iel influos mian agadon por Esperanto. La estonteco montros tion.

Via redaktoro

ESPERANTO DIREKT

Ny lärobok på svenska



114 sidor
90 kronor
plus porto

Eldona Societo Esperanto
Esperantoförbundet
Retadreso: eldona@telia.com
Telefon: 070-5850054

El mil kvincento, kvindeko da svedaj partoprenantoj

SIMPLA DEMANDO

Kion vi aparte
memoras de UK?

Tomas Q Nilsson:
Mi aparte memoras
la altkvalitan
internacian artan
vesperon, kun
multe da klasikeca
muziko kaj
bonetosa komuna
ludado.

Maria Sandelin:
Mi aparte memoras
renkontiĝojn kun
amikoj.

Ulla Luin:
La usona fonduso
ESF prezentis sian
agadon. Tiu fonduso
aktive kontribuis al
la starigo de bonaj
interretaj servoj,
inter alie "lernu.net".
ESF ne nur donas
monon, sed ankaŭ
atentas pri utilaj
kaj realismaj planoj
kaj pri la evoluo.

Kaisa Hansen:
La esperplenan
etoson dum la
Movada Foiro.

Sten Svenonius:
La KER-
ekzamenojn, tre
gravajn por la
prestigo de
esperanto

*Dekstre:
La kongresejo
Bella-center
Foto:
Olof Pettersson*

Okazis la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago 23-30 Julio 2011. Pluvis preskaŭ ĉiutage. Tamen la etoso estis bonega, ĉar esperantistoj ŝatas renkontiĝi.

La kongreso okazis en la kongresejo Bella Center sur la insulo Amager, proksime al la flughaveno Kastrup.

La programo kiel ĉiam estis bunta. Iam okazis sep aŭ ok programoj samtempe. En La Espero ni povas mencii nur kelkajn.

La inaŭguro kiel ĉiam estis formala afero kun salutoj i.a. de la ĝenerala sekretario de UNESKO, Irina Bokova, la nepo de L.L. Zamenhof, Louis C. Zaleski-Zamenhof kaj de reprezentanto de UN en Danio. La ĉi lasta faris paroladon en la dana pri la taskoj de UN. Traduko en Esperanto sekvis.

Internacia Kongresa Universitato, sub la gvido de Christer Kiselman ofertis pre-legojn pri naŭ diversaj temoj, ekz. pri astrobiologio, pri aidoso kaj pri vikingoj kiel historiografia demando. Kelkaj prelegoj okazis plurfoje kaj ankaŭ ebligis al la partoprenantoj ricevis ateston de Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino.

Estis ankaŭ ebleco kandidatiĝi por kaj skiba ekzameno por ricevi oficialan KER-diplomon por Esperanto.

Okazis kunsidoj de pluraj fakaj organizaĵoj, ekzemple kat-amantoj, kristanoj kaj fervojistoj.

Muziko, filmoj kaj kulturo

Menciindaj estas ankaŭ pluraj koncertoj. Ludis i.a. Jomart kaj Nataša el Stokholmo, Solotronik eh Hispanio kaj Espo-Despo el Kopenhago, La Perdita Generacio el Härnösand kaj Rêviere el Italio. Tio atestas pri tio ke Esperanto-muziko vivas.

Vivas ankaŭ Esperanta filmarto. Ni povis ĝui plurajn filmojn pri Esperanto, sed ankaŭ la usonan milnaŭcentkvindekjar-eskan sed nove produktitan "Atako de la lunaj zombioj" kun dublita parolo en Esperanto lak kun paralelaj anoncoj anglaj /esperantaj. Al UK apartenas ankaŭ nacia vespero, en kiu oni povas ĝui la kulturon de la gastiganta lando. Ĉi jare tio okazis en Tivoli kun Gronlanda ĥoro, panomima teatro kaj klasikaj piana muziko kaj kanto. Fine de la semajno okazis internacia arta vespero kun tri partoj: klasika eŭropa, azia kaj ritma. Pri la UK oni povus skribi tutan revuon.

Leif Nordenstorm



Pri la Kopenhaga UK raportas gazetara komuniko de UEA:

Sabaton, la 30-an de julio, finiĝis la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago per la Solena Fermo, kiun gvidis la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta. Ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak faris resuman raporton pri la laboraj, klerigaj kaj kulturaj pro-grameroj. D-ro José Antonio Vergara legis la kongresan rezolucion.

Estraranino Claude Nourmont anoncis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj kaj Oratora Konkurso. Estrarano Amri Wandel disdonis diplomojn pri elstara agado al ok meritplenaj movadanoj kaj diplomojn pri elstara arta agado al kvar kulturaj agantoj. Estraranino Maritza Gutiérrez transdonis la esperantistan pacpremion, Premion Degučić, al s-ro HORI Jasuo el Japanio. Estraranino Loes Demmendaal transdonis diplomojn pri 50-jara kaj 40-jara seninterrompa membreco en UEA.

Post la ferma festparolado de prezidanto Dasgupta la partoprenantoj de la Internacia Infana Kongreseto ĝojigis la publikon per du kantoj.

Fine sekvis la transdono de la kongresa flago, kiun el la manoj de s-ino Schroeder akceptis la prezidanto de LKK de la 97-a UK, s-ro Nguyen Van Loi, kiu kore bonvenigis la kongresanojn post unu jaro al Hanojo. Pli frue, Barbara Pietrzak anoncis la decidon de la Estraro de UEA, ke la 98-a UK en 2013 okazos en Rejkjaviko, 36 jarojn post la antaŭa UK en la islanda ĉefurbo.


Post la komuna kantado de "La Espero" sub la gvido de la Internacia Koruso kaj ĝia estro Alan Bishop la prezidanto de UEA deklaris la 96-an UK fermita.

ILEI-konferenco Infanaj voĉoj sonis dum naŭ tagoj

La semajnon antaŭ la UK en Kopenhago mi por la unua fojo partoprenis ILEI-konferencon. Ĝi okazis en la Fakultato de Humanistiko de la Universitato de Kopenhago. La estro de la Departemento de Komunikiloj, Kogno kaj Komunikado, Carsten Fledelius, estis nia gastiganto. Li partoprenis la tutan konferencon kaj la sekvantan simpozion pri "Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado", kaj li vere admirinde atentis niajn bezonojn kaj solvis eventualajn problemojn.

La konferenca programo, kun la temo "Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado", plenis je interesaj prelegoj kaj diskutoj. Kio estas "kulturo", kiel instrui esperanton kaj interkulturon, kiel enkonduki esperanton en universitatojn, kia estas la situacio de esperantoinstruado en diversaj landoj, informoj pri diversaj projektoj rilate al instruado de kaj informado pri esperanto ktp. La unuan vesperon okazis "Interkona manĝvespero", kiam ni povis gustumi frandaĵojn, kunportitajn de konferencanoj el diversaj landoj. Dum aliaj vesperoj kaj dum la paŭzoj ni ĝuis interparoladojn, muzikon, ludojn kaj dancadon en la granda koridoro inter la prelegejoj. Merkrede posttagmeze estis aranĝita lingva festivalo, kie ni povis konatiĝi kun multaj lingvoj. Ni lernis interalie ke la infanoj en Ganao ricevas nomojn laŭ la tago de sia naskiĝo. Por tiuj, kiuj ne mendis la konferencan bankedon en restoracio Ravelin, estis aranĝita ekskurso al restoracio en Kristiania.

Teksto kaj foto: Ann-Louise



Alfred Kobina Arthur rakontas pri tri el la lingvoj de Ganao.

Dum naŭ tagoj Esperanto-Domo en Lesjöfors traehiĝis de infanaj voĉoj. Entute 51 personoj, de kiuj 25 infanoj, vizitis la domon por komuna ĝuo kaj evoluigo de la lingvaj konoj ĉefe de la infanoj. Okazis renkontiĝo de Esperantistaj familioj.

Vendrede vespere estis prezentadoj de muziko kaj skeĉoj, kiuj ĉiuj estis fervore aplaŭditaj de gepatroj kaj gefratoj. La muziko estis prezentita de grupo pere de pluraj ordinaraj instrumentoj kaj de ritma, kantanta ensemblo kun i. a. kaseroloj, plasta ujo, planko, tablobreto kaj -kruroj. La sketĉoj estis unuafojaj prezentoj kaj tre amuzis la publikon.

En la publiko estis i.a. Anna Ritamäki-Sjöstrand kun filino Sigrid, vestita papilie. Sigrid, kiu havas du kaj duonan jarojn, kutime parolas esperante hejme en Finnlando kun patrino kaj patrino avino. Sed nun ŝi havis eblon interparoli kun aliaj infanoj. Sigrid dum la semajno alproprigis uzeblan esprimon "kaj tiel plu". Anna estis plurfoje en Esperanto-Domo: dum KEF 1998 kaj 2005 kiam finna grupo rondvojaĝis de Stokholmo en la montaran regionon. Anna ne vizitis REF-on antaŭe, sed trovas ĝin avantaĝa por la filino. "Esperanto-Domo estas taŭga por aranĝo kiel REF – ne luksa, kaj la infanoj povas libere ludi." Ŝi diras. La grupo vizitis la muzeon de Lesjöfors, kie malnova mopedo estis tre interesa al Sigrid – kaj kompreneble la eblon ricevi glaciaĵon kaj sukon. Cetere oni naĝis, iris kaleŝe al strando por tagmanĝi, kaj veturis drezine/relcikle. Ili ankaŭ iris kanue kun Duncan Thomson kaj familio.

Duncan Thomson el Skotlando ankaŭ venis al sia unua REF. Ankau li vizitis Esperanto-Domon en 1998 KEF kaj poste en 2003 pro IJK. Li trovas tiun aranĝon tre malsimila al aliaj kiujn li partoprenis. Li havas pli

da respondeco nun, ĉar li venis kun edzino kaj filino Sofia, kaj la edzino ne flue parolas Esperanton. Kun familio estas pli streĉe, sed samtempe tre amuze. La filino prosperas dum la ludoj kune kun aliaj infanoj. La unuajn tagojn oni aktivis ĉefe endome pro la vetero, sed poste multe ludis ekstere, promenis laŭ la Trola pado.

Dek unu jarojn aĝa Monika Lund Machlik el Norvegio estas jam veterano, krom tiu ŝia deka REF, ŝi vizitis i. a. Novjaran Renkontiĝon en Germanio. Sed unuafoje ŝi vizitas Esperanto-Domon kaj ĉi-tie ŝi revidas multajn konatulojn. Plej agrable dum la semajno estis la bonaj ebloj baniĝi. Monika diras: "Mi memoros tiun REF pro la homoj kiujn mi renkontis kaj pro la bela loko."

Hokan Lundberg, unu el la organizantoj de REF-2011 finas jene: "La partoprenantoj de REF ĝenerale estis kontentaj kaj pri la aranĝo kaj pri la Esperanto-Domo en Lesjöfors. Lennart faris bonegan laboron en la kuirejo kaj ĉiuj plenkreskaj partoprenantoj bone helpis al li. Mi ĝuis la tempon en la Esperantodomo ankaŭ ĉi-foje. La organizado ne estis same streĉa kiel dum KEF-98 kaj IJK-2003 kaj do eblis multe esti kun la infanoj kaj en la bela naturo. Eble REF revenos al Lesjöfors post kelkaj jaroj!"

Anita Dagmarsdotter

Somera kurso dunivele

Kursoj en Lesjöfors okazis en du staĝoj: komencantoj kaj progresantoj. La lasta estis dividita en du partoj de kiuj unu kun la temo kuirejo. La grupoj finis sian laboron per prezentado de spektakleto kaj per eta sveda-esperanta-sveda vortlisto.

Instruistoj estis Kristine Tytgat, Nataša Bertse, Carl Mäsak kaj Anita Dagmarsdotter. Oni ekskursis al Luossastugan kaj aŭskultis kantojn de Dan Andersson.

Anita D

Pri la sama kurso skribis unu partoprenanto:

Mia estado en Lesjöfors estis ekscita kaj lerniga. Det hela bestod av en lägervistelse så väl som en samling kurser i Esperanto på olika nivåer. Lärarna så väl som eleverna visade ett genuint intresse för ämnet vilket gjorde det hela högst underhållande. Utflykter och aktiviteter i det vackra Värmland var en del av det hela och gjorde det roligare. Så kort och gott var upplevelsen en av de roligare jag har haft under sommaren och kan varmt rekommenderas.

Petter Nordenstorm

Rusa vizito en Karlstad

Grupo da rusoj survoje al UK haltis dum kelkaj horoj por manĝi, promeni kaj ekkoni la urbon.

Kafeje en Stokholmo

Oni tradicie renkontiĝis monate en diversaj kafejoj. UK-partoprenantoj el Hungario kaj Kubo vizitis la klubon.

Ĉiumonate en Gotenburgo

Dum aliaj kongresis en Majo grupo informis dum Tuvedagen (Tuve/Hisingen).

La klubo vizitis al Fransisco Pietro kaj familio en Junio.

La kafejo en Slottskogen, Bel Parc, logis grupon renkontiĝi meze de Julio. La aŭgusta renkontiĝo okazis parte sur la pramo. Ālvsnabben survoje al Kusten, parte en kafejo. Kusten estas la loko de kie maristoj kaj varoj enboatiĝis por transporto al la maraj ŝipoj al aliaj landoj kaj mondpartoj.

Sten Svenonius el Malmö invitis gotenburganoj al sia kabano en Kvarnabo.

Komence de aŭgusto Neil Blonstein el New York vizitis la urbon kaj klubanoj kaptis la okazon i. a. ekskursis al insulo Vrångö, plej sude en la arkipelago.

Anita D



Aino Åberg, Fransisco Pietro, Siv Burell och Niel Blonstein på Språkkaféet.

Libro al ambasadoro

Roland Lindblom kaj Olof Pettersson (kiu fotis) oficiale transdonis la libron Stelsemanoj en la ora nordo de Katalin Kováts al la rumana ambasadoro Raduta Matache.



Prelego pri Nepalo

Marde la 2-an de aŭgusto okazis tre agrabla kaj neordinara renkontiĝo. La Malmö Esperanta Klubo gastigis tri esperantistojn de malproksima Nepalo: Indu Devi Thapaliya – prezidantino de NEspA (Nepala Esperanta-Asocio), Bharat Ghimire – ĝenerala sekretario de NEspA, kaj Parashar Rijal.

Post la prezentado de ĉiuj kunvenantoj, Bharat rakontis pri sia lando kaj montris la mapon. Ni eksciis pri geografio: ebena sud-okcidenta parto (ĉirkaŭ 100 m super la marnivelo) kaj akraj pintojn je la orient-norda (pli ol 8840 m super la marnivelo). Oni miras ke la distanco inter la du punktoj estas ĉirkaŭ 400 km. Oni devas ankaŭ konscii ke 8 de 10 la plej altaj montopintoj en la mondo troviĝas ĝuste en Nepalo.

Oficiala lingvo estas nepala, tamen en la lando loĝas multaj diversaj kaj tute apartaj loĝantgrupoj. Ili malsimilias ne nur lingve. Ankaŭ moroj, tradicioj, vizaĝaspekto tute diferencas. Tio malhelpas kunigi kaj regi la civitanojn.

La plej gravaj religioj estas budismo kaj hinduismo, sed ankaŭ troviĝas kristanoj kaj islamanoj.

Ni spektis bildojn de Kathmandu, faritajn dum mia vojaĝo tien printempe. Bharat povis rakonti pli pri temploj kaj klarigi bildojn. Estis multaj demandoj kaj niaj gastoj provis klarigi kiel eble plej klare.



Fine ni kompreneble faris la komunan bildon.

Ursula Kwazniewska

TRA LA MONDO

Instruisto pri matematiko en la Instituto Zamenhof, Lomé, deziras korespondi, speciale kun fraŭlino. Akpayedo Kodjo Michael estas 25-jara. retadreso: makpayedo@yahoo.fr (pli da informoj je: w.posthuma@esperanto.se)

Tack för gåvor

Yngve Sörman, Årsta, Thordis Samuelsson, Jönköping, Tony Björnström, Luleå, och Martin Persson, Orsa.

Vojaĝu kun Pasporta Servo!

Ĉu vi scias, ke nuntempe oni povas trovi gastigantojn de Pasporta Servo pere de Interreto? Eniru la retpaĝaron www.pasportaservo.org. Tie vi sur monda mapo povas vidi kie loĝas la gastigantoj kaj, se vi registriĝas, vi povos legi la informojn pri la gastigantoj kaj kontakti ilin. Ne timu, vi ne devas mem fariĝi gastiganto, se vi registriĝas – nur uzanto.



Mi trovis, inter aliaj Mark Starrs en Tajlando. Li estas universitata instruisto kaj loĝas en Chon Buri. Sur la foto: Mark kun edzino Nida.

Kiam vi planas vojaĝon, kontrolu en Pasporta Servo ĉu troviĝas gastigantoj en lokoj, kien vi volas iri.

Ann-Louise

Universitato de Esperanto

Ĉinio, Januaro - Februaro 2012
Se vi jam parolas Esperanton flue kaj se vi volas lerni per Esperanto pri fakoj kaj temoj kiuj povas havi edukan rolon en via vivo, vi eble interesiĝos pri la Universitato de Esperanto, kie nia internacia lingvo utilos por plivastigi konojn kaj sciojn ekster nia kelkfoje tro limigita mondo de la lingvo Esperanto.

La unuaj kursoj de la Universitato de Esperanto okazos samloke kiel la tre tre intensaj kursoj kaj la instruistaj kursoj, tio estas, ĉe la Universitato de Hajnano ĉe la Esperanto-Insulo. Ĉiu universitata kurso daŭros 40 horojn entute, 2-horojn ĉiutage, de lundo ĝis vendredo, inter la

11a de januaro kaj la 12a de februaro 2012.

Vi ne trovos lingvajn kursojn en la Universitato de Esperanto, ĉar la celo de la projekto ne estas lerni pri Esperanto sed lerni per Esperanto. Estas multe da aliaj lokoj en Esperantujo kie vi povas lerni pri Esperanto. Por tion fari bonvolu konsulti edukado.net aŭ la kursojn kiuj okazas en Poznan.

Nun stariĝas antaŭ ni du elstaraj kursoj:

1 Alfronti militon -- Profeso Ron Glossop, Usono
2 Filozofio kaj la historio de informadiko, Profeso Federico Goboo, Italio.

Estos ankaŭ alitemaj kursoj. La celo estas havi tri, kvar aŭ kvin universitat-nivelajn kursojn por Esperanto-Insulo. Ĉiu kurso estos 40-horoj, kaj daŭros unu monaton.

www.esperanto-insulo.info/universitataj.htm

Retejo en facila Esperanto

Naŭ el dek homoj, kiuj iom lernis Esperanton, poste forlasas la lingvon, asertas la iniciatintoj de facila.org, nova retejo kun mallongaj, facile legeblaj tekstoj en Esperanto. Laŭ la iniciatintoj de la projekto Facila vento, tre ofte lernintoj seniluziiĝas, ĉar ili rimarkas, ke Esperanto ne estas tiel facila, kiel oni asertis al ili, kaj ke ordinaraj tekstoj ne ĉiam estas kompreneblaj sen peno kaj vortaro. Por malaltigi la sojlon, ili kreis retejon kun vere facilaj tekstoj. Komencantoj povas aboni la tekstojn retpoŝte, kaj tiel regule ricevos memorigon plu lerni Esperanton. Aldone ili trovos ligilon al la originala, nesimpligita teksto, klarigas Emilio Cid en intervjuo de Libera Folio. Vizitu facila.org.

liberafolio.net

Infana kongreseto

42a Internacia Infana-junula Kongreseto kun la temo "Vikingoĵ" okazis de 23a ĝis 30a de julio 2011 urbo Hundested, Danujo. Partoprenis 32 infanoj 4-17-jaraj kaj 7 gvidantoj el 15 landoj kaj tri kontinentoj. El Svedio partoprenis Olof Nordenstorm.

Nobelpremio al 7 esperantistoj

Ĉu vi scias, ke sep Esperantistoj, ricevis Nobel-premion:

Sir William Ramsay (Ĥemio, 1904), Joseph Thompson (Fiziko, 1906), Albert Hermann Fried (Paco, 1911), Charles Richet (Medicino, 1913), Daniel Bovet (Medicino, 1957), Reinhard Selten (Ekonomio, 1994).

Etsuo Miyoshi

Himalaja renkontiĝo

Ĉiun duan jaron okazas en Nepalo Himalaja Esperanta Renkontiĝo. La 26-an de februaro ĝis la 8-a de marto 2011 okazis la 9-a renkontiĝo. Partoprenis entute 65 esperantistoj.

La partoprenantoj inkluzivis dek ses el Francio, naŭ el Japanio, du el Svedio, du el Mongolio, kaj du el Danio; ĉiuj aliaj estis nepalanoj.

La renkontiĝo estis tre bone organizita kun vizitoj al interesaj temploj kaj lokoj en Kathmandu kaj ĉirkaŭaĵoj. Post 3 tagoj ni veturis al la natura rezervejo por piedmarŝado. Vere bona kaj interesa sperto.

Ursula Kwazniewska



Amri Wandel, Melanie Maradan, Eckard Bick och Christer Kiselman under Terminologia Forumo. Foto: Olof Pettersson.



Aŭtuna Renkontiĝo en Värmland, Svedio

Datoj: 28 - 30 de oktobro 2011
Lokoj: Esperanto-Domo kaj Popoldomo en Lesjöfors

Iom pri la programo:

Jarkunveno de la Esperanto-domo
Diskuto pri la ŝanĝoj de stato kaj statuto de la Sveda Esperanto-Instituto
Programeroj pri alternativa medicino (s:ro H. Schicke, Germanio kaj Stella Lindblom)

Muziko kaj dancado (internacia muzikgrupo Diverslingve (Nataŝa kaj Andreo Bertse)

Prezento de la materialo "Esperanto direkt" de Stano Marcek.

Por pli da informoj: Wim Posthuma, w.posthuma@esperanto.se

Bonvenon al agrabla kunestado

Kontakto:

Esperanto-Gården / Esperanto-Domo
Stiftelsevägen 1,
680 96 Lesjöfors
Tel. 0590-30909,
mobil 070-767 54 55
egarden@esperanto.se

Esperanto-Gården: Årsmöte
Esperanto-Domo: Jarkunveno
Kallelse till årsmöte i Lesjöfors,
lördagen den 29 oktober, kl 14
Kunvoko al jarkunveno en Lesjöfors,
sabate la 29 oktobro, je 14a horo

LINGVO

Terminologi- forum

Att utarbeta termer med specifik och avgränsad betydelse är ett slags standardiseringsarbete. I slutändan är det en fråga om samförstånd, att veta att alla inblandade talar om samma saker. Melanie Maradan, som är UEA:s representant i standardiseringsorganisationen ISO:s kommitté för terminologi och andra språk- och innehålls-resurser, inledde Terminologia Forumo under esperantokongressen i Köpenhamn med att tala om standardiseringsarbete och arbetsflöden.

Under samma forum talade även Amri Wandel om vikten att arbeta med terminologifrågor, att aktivt vara med och diskutera från början när nya termer behöver skapas, eftersom det är svårare att påverka och försöka lansera ett ord när ett annat väl fått spridning. Verbet *googla* som exempel har väl hos många närmast övertagit *att söka på nätet*, oavsett om man använder Googles sökfunktion eller någon annan, och det likaljudande nya verbet *gugli* på esperanto kanske på samma sätt är vanligare än det mer allmänna (*ret*)*serĉi*. Humphrey Tonkin kommenterade detta med att *fotokopiera något* – åtminstone på engelska – ibland kallas *xerox* snarare än *photocopy* efter namnet på ett kanske en gång marknadsledande företag på området, och det finns säkerligen andra exempel.

Amri Wandel diskuterade också om till exempel det sociala nätverket Facebook bör få ett eget namn på esperanto. En del säger *fejsbuko*, en del *visaĝlibro*. Amri hade ett eget förslag *amikareto* som kan tolkas på flera sätt, *amika reto*, *amikar-eto* eller *amikar-reto*. Fast ett sådant namn kan jag själv tycka snarare betecknar sociala nätverk i allmänhet, det finns ju andra aktörer än Facebook, eller ens bekantskapskrets på nätet eller över huvud taget. Namn på

specifika produkter eller tjänster – i synnerhet de som är varumärken – brukar inte hamna i ordböcker. Åtminstone inte sådana av mer allmän karaktär, förrän efter många år och då har kommit att få en mer vedertagen allmän betydelse.

Världen på nätet utvecklas och förändras snabbare än den i tryckt form på papper. Marek Blahuš visade apropå detta exempel från ett pågående projekt mellan organisationerna E@I och SAT, att omvandla PIV, Plena Ilustrita Vortaro, från pappersform till digital form och sökbar på nätet på sidan *vortaro.net*. Här är problemet att ursprungstexten är i ett äldre format, vilket gör den besvärlig att uppdatera och ändra, och framförallt göra sökbar. Arbetet är förstas tidskrävande, men kommer förhoppningsvis på sikt leda till en oftare uppdaterad och mer tillgänglig ordbok. Och den kommer nog även fortsättningsvis finnas tillgänglig i tryckt form för den som föredrar.

Olof Pettersson



Nova peranto por UEA

Ek de la 1-a de novembro mi transdonos mian okupon kiel peranto por UEA kaj peranto por eksterlandaj esperantorevuoj al Leif Holmlund. Mi dum 24 jaroj havis tiajn funkciojn kaj dum la jaroj mi tre ĝuis la kontaktojn kun la svedaj esperantistoj. Mi kore dankas pro la bona kunlaboroj kun vi ĉiuj.

Lisbet Andreasson

La adreso de Leif Holmlund:
Kågevägen 40 B,
931 38 Skellefteå
Retpoŝto:
leif.holmlund@telia.com

Pri arto kaj aventuroj



La sekreto de la arbaro de Lascaux. Felix kaj Bigotto. Tradukis grupo da esperantistoj. Bildstria libro. 48 paĝoj.


Ni esperantistoj ofte fieras pro tio ke ankaŭ ni posedas Tinĉon kaj Asterikson, bildstriaĵoj kiuj aperis ankaŭ en la sveda kaj en aliaj lingvoj. Nun ni fieru des pli ĉar ni havas ege belan bildstriaĵon, kiu ĝis nun ne aperis en la sveda.

Ekster franca urbeto troviĝas truo en la tero, kiu estas konsiderata problemo, ĉar bestoj povas fali en ĝin. Tial oni diras ke oni devas iel pleniĝi ĝin. Kiam kelkaj knaboj trovas la truon tamen montriĝas ke ĝi estas la kunen-falinta malfermo de granda kaverna sistemo, sur kies muroj la knaboj je sia granda surprizo trovas amasojn da pentraĵoj. Unue ili promesas nenion diri pri la sekreto, sed kiam ili fine allogas sian estintan instruiston iri kun ili en la kaverton, tiu komprenas ke temas pri ŝtonepoka arto. Nun la kavernoj de Lascaux estas unu el la plej famaj vidindaĵoj de la mondo. Pro problemoj pri ŝimo pro la elspiroj de la turistoj, oni nuntempe montras nur kopion de la grotto.

“La sekreto de la arbaro de Lascaux” estas belega bildrakonto pri arto kaj pri aventuroj.

Leif Nordenstorm

Handbok i informerande



Informado praktike. Ziko van Dijk. Flandra Esperanta Ligo 2007. 112 sidor. Ca-pris € 15 från UEA eller FEL.

Informado praktike är, som titeln antyder, en praktiskt inriktad bok på esperanto, om att informera om esperanto till allmänheten, eller för den delen inom den egna esperantoföreningen i form av nyhetsbrev eller klubbtidningar. Exemplet är inriktade på esperantoföreningar och relaterade verksamheter, men mycket av innehållet kan förstås tillämpas även på andra föreningar med begränsade resurser.

Boken är indelad i åtta kapitel eller avsnitt, så det är inte en bok man behöver läsa från pärm till pärm, utan mer av en handbok. Inledningsavsnittet handlar till exempel bland annat om kontakt med journalister, vad man bör tänka på i samband med intervjuer och fotografering, och innehåller även ett antal vanliga frågor om esperanto och tänkbara svar: Om dess tillkomst, hur och var det används, är det verkligen lättare att lära sig än alla andra språk, vanliga missförstånd och fördomar och så vidare.

Det andra kapitlet tar upp typografi, val av typsnitt och olika sätt att framhäva text med kursivering, fetstil och understrykning. Några allmänna råd om stil tas också upp, liksom vilken information pressmed-

delanden bör innehålla och lite om hur man skriver reklamtexter för kurser.

Tredje och fjärde kapitlet handlar om att skriva informationsblad och saker man bör tänka på när man delar ut dessa om man har ett informationsbord på en mässa eller liknande. Även om man kanske lagt ner en del arbete och pengar på att skriva och trycka upp dem, är det kanske många gånger ett högre mål att prata – och lyssna – och ge ett positivt intryck snarare än att dela ut så många blad som möjligt.

Det femte kapitlet handlar om webbsidor och förslag om vad för slags innehåll som kan vara lämpligt för en esperantoförening, men också sådant som kan vara olämpligt ur tillgänglighetsperspektiv, som för liten text, olika färgkombinationer, animationer och musik.

Det sjätte kapitlet tar upp allmänna råd kring att föreläsa, hur man förbereder sig, står och går, om man ska använda bilder, hur man kan hantera nervositet och så vidare, och det sjunde handlar om att föreläsa på esperanto, men är också ganska allmänt om saker att tänka på när man föreläser på ett annat språk, som målgruppens språkkunskaper och kunskaper om ämnet, men också om hur man organiserar föreläsningar som andra ska hålla.

Slutligen, i det sista kapitlet, ges några förslag på lekar och aktiviteter man kan använda sig av på kurser och seminarier, till exempel att öva intervjuer och svara på frågor, antingen parvis eller i grupp.

Boken ger också förslag på när och hur man kan ta upp egna exempel från den egna klubbens verksamhet eller egna erfarenheter för att ge ett mer personligt intryck. Författaren, understryker också på olika sätt vikten av att vara saklig när man informerar om esperanto, vilket nog i min mening är ett av de viktigaste råden.

Olof Pettersson